Kongresaj perantoj

Sendu viajn aliĝilon kaj pagon al la sama adreso. Aliĝojn oni traktos nur post pago de la kotizo.

Aŭstrio	Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg
Belgio	Claude Glady, 1 rue du Culot, 5630 Cerfontaine
	aŭ Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstr. 169, 2060 Antwerpen
Britio	Esperanto-Asocio de Britio, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE
Ĉeĥio	Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Petro Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice
Ĉinio	Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, 100037 Beijing
	aŭ Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro Ora Ponto, Shijieyu Zhongxin, Jingchuan-Xian, 744300 Pingliang
Danio	Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4.tv., 2100 København
Estonio	Ahto Siimson, Rüssa tee 2, Liu, 88313 Pärnu, Pärnumaa
Finnlando	Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki
Francio	Esperanto-France, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris
Germanio	Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger Str. 9, 55129 Mainz
Hispanio	Pedro A. Garrote Escribano, C/ Las Mercedes 5-5º-C, 47006 Valladolid
	aŭ Kataluna Esperanto-Asocio, Hotel d'entitats Can Guardiola, carrer Cuba 2, 08030 Barcelona
Hungario	Hungaria Esperanto-Asocio, Pf. 193, 1368 Budapest
Israelo	Jehoŝua Tilleman, 97-a Dereĥ-Akko, 2637324 Kirjat-Mockin
Italio	Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, 20143 Milano
Japanio	Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, 162-0042 Tôkyô
Kanado	Kanada Esperanto-Asocio, 414-110 Grand Ave., London ON, N6C 1L8
Korea Resp.	Korea Esperanto-Asocio, 464 Ho, 217, Toegye, Jung-gu, Seoul, 04558
Latvio	Margarita Želve, Rūpniecības iela 35-13, Rīga 1045
Litovio	Litova Esperanto-Asocio, ab.k. 167, 44002 Kaunas
Nederlando	UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam
Norvegio	Agnar Fitjar, Wiers Jenssens vei 33A, 5089 Bergen
Pollando	Jan Skonieczka, ul. Chłodna 23ª, 85-345 Bydgoszcz
Portugalio	Portugala Esperanto-Asocio, Praceta Humberto Delgado, 1 - B, Monte Abraão, 2745-318 Queluz SNT
Rusio	Halina Gorecka, ab.ja. 1205, 236039 Kaliningrad
Slovakio	Ľubomír Fajth, Prosné 161, 01 801 Udiča
Svedio	Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, LGH 1303, 931 38 Skellefteå
Svislando	Konto CH86 0900 0000 1200 2310 0 *je la nomo* "Universala Esperanto-Asocio"
Usono	Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103

tourism northernireland

Belfast visit Belfast

Fotoj: ©Northern Ireland Tourist Board *Teksto:* Loka Kongresa Komitato *Grafiko:* F. L. Veuthey

106-a Universala Kongreso de Esperanto

Belfasto, 17 – 24 julio 2021

Unua Bulteno

Belfasto bonvenigas vin

Belfasto, ĉefurbo de Nord-Irlando, estis dum la deknaŭa jarcento la mondcentro de la linaĵo-industrio. En la komenco de la dudeka jarcento oni konstruis ĉi tie kelkajn el la plej grandaj ŝipoj de la mondo, inkluzive de la fama luksa vaporŝipo Titanic.

Nuntempe Belfasto estas moderna kaj dinamika urbo kun pluraj allogaĵoj, kiel la kvartaloj Titanic, Katedralo, Gaela kaj Nova Kvartalo, la urbo-domo kaj la kastelo. Krome, oni povas promeni laŭ la rivero Lagan kaj laŭ la vojo de la populara televidserio *Ludo de Tronoj*.

En la Reĝina Kvartalo situas la Reĝina Universitato, kie okazos nia kongreso. Apude, eblas promeni en la Botanika Ĝardeno kaj viziti la Ulsteran Muzeon. Ne malproksime troviĝas la Internacia Rozĝardeno kaj la Atleta Kurejo, kiu nomiĝas Mary Peters, laŭ la nomo de unu el niaj gajnintoj de oraj medaloj en la Olimpikoj.

Horloĝdirekte: Trotuaro de Giganto. Angiloj de Lough Neagh. Mourne-montoj. La Belfasta kastelo.

Gustumu lokajn specialaĵojn!

La ulstera fritaĵo, la pomsuko kaj cidro de Armagh, la viskio de Bushmills kaj la angiloj de Lough Neagh estas tipaj. Malkovru *champ* kaj ĝuu kun ni terpompanon kaj sodopanon.

La giganta; la plej granda kaj malgranda; la plej malnova...

Ekster Belfasto, ĉe la norda marbordo, dum la mita periodo de gigantoj, grandega homo onidire konstruis vojon, la Trotuaron de Giganto.

En la pli modernaj tempoj, dum la dekoka jarcento, elfosiĝis kanalo inter

Portadown kaj Newry. Temas pri la plej malnova ŝtuparkanalo en la insuloj Britio kaj Irlando.

Nord-Irlando estas la plej malgranda parto de la Unuiĝinta Reĝlando kaj enhavas ĝian plej grandan lagon, Lough Neagh.

Landeto kaj loĝantoj

Oni diras, ke ni estas sinceraj, amikemaj kaj bonkoraj. Ni certe volas bonvenigi vin al nia landeto, kie troveblas montoj, kasteloj, kamparaj parkoj, malgrandaj familiaj farmbienoj kaj ankaŭ grandaj kamparaj domegoj.

Ĉi tie oni ĝuas multajn muzikĝenrojn. La Ulstera Orkestro proponas klasikan, kaj la loka trinkejo-muziko estas fama kaj populara. Du specoj de sakŝalmo aŭdeblas: la skota sakŝalmo kaj la irlanda kubuta sakŝalmo. La muzikistoj James Galway kaj Van Morrison naskiĝis en Belfasto.

Niaj verkistoj inkluzivas Clive Staples Lewis kaj Seamus Heaney. La patro de la famaj verkistinoj, la fratinoj Brontë, naskiĝis en Nord-Irlando, same kiel la aktoroj Liam Neeson, Kenneth Branagh kaj James Nesbitt inter aliaj.

El niaj sportistoj, la golfisto Rory MacIlroy kaj la futbalisto George Best estas eble la plej konataj.

Nord-Irlando bonvenigas vin!